

CxEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio sendata al cxiuj rete atingeblaj membroj de CxEA sed ankaux al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne volas ricevadi gxin, sufixas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. Dauxra ekspozicio pri Esperanto ekde septembro
2. Artikolo pri Esperanto kun eraroj
3. Grava kongreso de CxEA en PĹTMerov
4. Starto - organo de CxEA
5. Turistoj kaj amantoj de naturo atentu
6. Cxehxa Esperanto-junularo aktivas (oficiala rubriko de CxEJ)
7. Kalendaro de Esperanto-eventoj en Cxehxio

1. DAUxRA ESPERANTO-EKSPOZICIEJO PRI ESPERANTO EKDE SEPTEMBRO

Malgraux tio, ke CxEA ne ricevis la financon subtenon de la Ministerio pri kulturo, tamen, kunabore kun la Urbaj instancoj de Svitavy, precipe la urba muzeo, la 20-an de septembro estos inauxgurita la dauxra ekspoziciejo pri Esperanto en la granda salono de Domo de Ottendorfer, kiu estis origine konstruita kiel urba biblioteko kaj estis siatempe kun siaj pli ol 22000 libroj ne nur la plej moderna, sed ankaux la plej granda germanlingva bibliotelo en Moravio. La inauxguron de la nova Esperanto-muzeo promesis partopreni inter aliaj ankaux la direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno Herbert Mayer. La konkretan rixan programon por la tagoj 20-a kaj 21-a de septembro vi trovos en gxuste nun presata Starto 2/2008 aux vi povas peti pliajn informojn cxe Libuše DvoĹTMĤkovĤ~ <dvor.libuse@...>.

2. ARTIKOLO PRI ESPERANTO KUN ERAROJ

Kiu legis la dupagxan intervjuon pri Esperanto kun Petro Chrdle en la Magazino de HalĤĤ noviny la 23-an de majo, versxajne miris pri malgxustaj enkondukaj informoj. Bedauxrinde la redaktoro sentis bezonon iel enkonduki la intervjuon kaj do elsercxis informojn en la reto sed dume ne havis felicxan elekton. Se vi do legis pri multaj filioj de UEA en la mondo, ktp., sciu, ke tiom sukcesa la evoluo de UEA reale ne estas, sed la redaktoro jam promesis gxustigi la informon en proksima tempo en la kultura rubriko de HalĤĤ

noviny. Ni esperu, ke tiu eraro ecx helpas, ke la informo pri Esperanto aperas dufoje kun mallonga tempa distanco.

3. GRAVA KONGRESO DE CxEA en PL[?]EROV
cxijare finigxas la elekto periodo de la cxehxa estraro dum la CxEA-kongreso en PLTMerov de la 3-a gxis la 5-a de oktobro estos elektita la nova CxEA-komitato. Sed tio ne estas ununura grava punkto de la kongreso. Tie ankaux estos decidite pri la nova CxEA-logoo kaj ankaux vi povas influi gxin sendante sian vocxon por iu el la ricevitaĵoj proponoj. Kiu propono ricevos plej multe da vocxoj, tiu havos la plej grandan sxancon esti akceptita per la partoprenantoj de la kongreso kiel la nova logoo. Venis entute 7 proponoj, sed en la ludo estas ankaux la nuna logoo, kiu do estas ankaux unu el tiuj, por kiuj eblas vocxdoni. Cxiujn vi povas vidi en la numero 2 de Starto aux baldaux ankaux sur la pagxo <http://www.esperanto.cz/> Oni povas vocxdoni ankaux rete al jirka.tomecek@... Cxiu rajtas vocxdoni por pli da proponoj, sed nur unufoje. Krom tiuj du gravaj decidoj de la kongreso gxi promesas ankaux interesan programon (kaj prelegojn, kaj amuzigxon), do certe valoras partopreni. La detaloj kaj aligxiloj estas en Starto n-ro 2 kaj ankaux sur <http://www.esperanto.cz/>. Kaj pli da informoj vi povas ankaux ricevi cxe: jirka.tomecek@...

4. STARTO

Starto estas oficiala organo de Cxehxa Esperanto Asocio aperanta regule kvarfoje jare cxiumarton, junion, septembron kaj decembron. Gxin redaktas Miroslav Malovec, malovec@... kaj enhave gxi estas pli detala kaleidoskopo pri la Esperanto-movado en Cxehxio, sed ankaux pri la plej gravaj okazajxo eksterlande, ol kion ebligas la CxEA-retkomunikoj. Cxiuj membroj de CxEA ricevadas gxin auxtomate, sed eblas gxin ankaux aboni sen neceso aligxi al CxEA. La jara abontarifo estas por logxantoj en Cxehxio 200 CZK, se sendate eksterlande 10 EUR, se aerposxte 13 EUR.

5. TURISTOJ KAJ AMANTOJ DE NATURO ATENTU

Kiel cxuijare, la plej granda ekoturisma renkontigxo en Cxehxio, nome EKOTUR, estas organizata kaj por piedturistoj, kaj por biciklantoj. Ni provis gxin pliricxigi ankaux pri almenaux unutaga kanuado, tamen neniuj aligxis, do

cxi-jare ni ne plu proponas tion. Kiel vi scias jam de la kalendaro en pasintaj CxEA-retkomunikoj, gxi okazos de la 23-a gxis la 30-a de auxgusto en Bohemia Karsto kaj orienta parto de la montetaro Brdy, do tre proksime al Prago. Oni logxos dum la tuta semajno en famkonata Karlštejn, kie estos ankaux komunaj vesperaj programoj, plejparte pri ekologio kaj turismo, sed la ricxeco dependas de la proponoj de partoprenontoj. Oni indikas en la aligxilo, cxu oni deziras bicikli aux piedturismi, sed sciu, ke eblas tion sxangxi dum la semajno (ecx ripete). Gxis nun aligxis cxehxoj, germanoj kaj unu bulgarino. SED GRAVA ATENTIGO: La 15-an de junio necesas malmendi la neuzotajn litojn (kaj en luksaj pensionoj, kaj en la turisma tranoktejo). Kiom longe post tiu dato eblos ankoraux aligxi dependas de tio, cxu restos liberaj cxambroj, kio dum la feriomonatoj en Karlštejn ne havas grandan probablon. Tial, kiu hezitas, bv. decidigxi baldaux! Kaj se vi aligxos post tiu dato, bv. ne pagi antaux ol vi ricevos konfirmilonb, ke por vi estas ankoraux libera cxambro (aux loko en plurlita cxambro, lauxdezire). Pli da informoj kaj aligxiloj: <http://www.kava-pech.cz/ekotur> aux [cxe info@...](mailto:cxeinfo@...)

6. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (oficiala organo de CxEA redaktata de ties prezidanto Marek Blahuš):

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) per decido de TEJO estas elektita venontjare organizi la 65-an Internacian Junularan Kongreson (IJK). Gxi okazos ekde la 18-a gxis la 25-a de julio 2009 en Liberec. Temas pri unika atingo de nia junulara esperanto-movado, cxar ankoraux neniam en historio okazis IJK sur la teritorio de Cxehxio, nek Cxehxoslovakio. Pri la kongreso kunlaboros Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj, sed cxiuj aliaj helpemaj esperantistoj estas ankaux bonvenaj.

Ankoraux fine marto BĤra ZĤVODSKĤ cxeestis Internacian Junularan Festivalon en Italio. Komence de aprilo Marek BLAHUŠ kaj Jan URBĤNEK kungvidis seminarion pri Vikipedio dum Sabla Printempo en PĤsek, kaj semajnon poste Marek BLAHUŠ, Mirek HRUŠKA kaj Michaela BALĤINOVĤ cxeestis la arangxon Adonido en RatĤškovice/Vracov. Fine de aprilo Marek BLAHUŠ voĵagxis al Roterdamo por cxeesti la Malferman Tagon en la Centra Oficejo de UEA, kien venis ankaux nova membrino Eliška VOTĤPKOVĤ, auxtoro

de studlaborajxo pri Esperanto-movado en Opava.
Maje Mirek HRUŠKA voĵagxis al Pollando.

Per grupa mendo de CxEJ ok homoj acxetis
ekzempleron de Pasporta Servo 2008. Okaze de la
100-jarigxo de UEA aperis fine de aprilo en
Cxehxa Radio Leonardo intervjuo kun Marek BLAHUŠ,
farita de Dan MRÁ?ZEK. La duopo ankaux
efektivigis cxehxan tradukon kaj dubladon por
nove eldonota filmserio "Esperanto estas..." de
E@I. Petr DOHNÁ?LEK prelegis pri esperanto al
universitata katolika junularo en Prago. Marek
BLAHUŠ renomumigxis komitatano A de TEJO por la periodo 2008-2010.

En la TEJO-revuo Kontakto 2008:1 aperis artikolo
de Marek BLAHUŠ pri ludo geokasxado sub titolo
"Malpli romantika, sed pli naturamika..." La
elstara artikolo pri Esperanto en la cxehxa
Vikipedio, kunverkita de kelkaj CxEJ-anoj, aperas
inter la 2-a kaj 8-a de junio cxefpagxe
(<http://cs.wikipedia.org>) kiel artikolo de la
semajno. Ankaux lokaj kluboj en Prago kaj Brno
aktivis kaj akceptadis plurajn gastojn.
Raportajxoj pri tio kaj cxiuj aliaj aktualajxoj
pri cxehxa junularo troveblas cxe <http://cej.esperanto.cz/>

8. KALENDARO de E-ARANGxOJ EN CXEHxIO kaj ORGANIZATAJ EL CXEHxIO

Gxis 18/06/22 en Urba Palaco Templ en MladĀ
Boleslav ekspozicio VIVANTA LINGVO ESPERANTO,
kiun organizas Esperanto-klubo Mnichovo HradištĀ
+ MladĀ Boleslav. Inf.: vanekmi@... aux drahotovaesperanto@....

2008-06-15, ekde la 12:00: Jam la 75-a Trilanda
(CZ, PL, SK) Renkontigxo en la pinto de la
landlima monto Cxantorio. El la pola flanko eblas
uzi telferon, de la cxehxa flanko oni devas
piedumi. Pli da informoj cxe Jaroslav SuchĀnek: suchanekj@...

2008-06-19/22 TREP (Turisma Renkontigxo de
Esperantistoj en Plasy). Inf. Stanislav Pech <esperantoplzen@...>

2008-06-29/07-12, -07-13/26, -07-27/08-09. Somera Esperanto-Tendaro en
LanĀřov, la Esperanto-arangxo kun la plej longa tradicio en Cxehxio, jam
kvindekan fojon en la sama loko! Cxiutaga antauxtagmeza lauxelekta
instruado de lingvo (cxiam ankaux Esperanto
elekteblas). Inf.: podhradska@...

2008-07/28-08/04: KRISTANA KONGRESO (la 58-a kongreso de KELI) en la
hotelo ESPERANTO en Pribylina, Slovakio. Pliaj
informoj kaj aligxiloj: Pavel PolnickĀ, cea.polnicky@...

2008-08-23/30: EKOTUR 08, Tradicia ekoturisma renkontigxo por biciklantoj kaj piedturistoj kun komunaj vesperaj programoj. Karlštejn cxe Prago, inf.: <http://www.kava-pech.cz/ekotur> aux chrdle@...

2008-09-20/21: Solena inauxguro de dauxra Esperanto-ekspozicio cxe urba muzeo en Svitavy. Inf.: dvor.libuse@...

2008-10-03/05: La 12-a kongreso de Cxehxa Esperanto-Asocio, kun elekto de novaj komitatanoj de CxEA en PĹ™erov. Inf.: jirka.tomecek@....

2008-10-06/12: InPaSem 2008 (Internacia Paroliga Semajno), Kurso por komencintoj kaj seminarioj por jamaj parolantoj. Antauxtagmeze instruhoroj, posttagmeze turisma programo en Prago kaj cxirkauxajxo. DobĹ™ichovice, inf.: <http://www.kava-pech.cz/inpasem/> aux chrdle@....

2008-11-07/09: KAEST 2008 (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en DobĹ™ichovice. Prelegontoj sendu resumon de sia kontribuo gxis la fino de julio. Laux la intereso planata paralele seminario kun la temo "Prifaka kontribuado al Vikipedio". Inf.: <http://www.kava-pech.cz/kaest> aux chrdle@...

2008-11-28/30: IKF (Internacia Kultura Festivalo) en ĀštĀ nad Labem, inf.: m.smycka@...

En la kalendaro estas envicigitaj nur la eventoj, kiuj okazos en Cxehxio, aux organizataj el Cxehxio. La eventojn en eksterlando vi trovos cxe <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>

Cxu vi ne trovis vian arangxon en la listo? Ne kulpigu nin, sed vin mem, ja ne eblas envicigi eventon, pri kiu ni ne konscias. Pri la preparataj arangxo bv. sendi informon al chrdle@..., ke gxi povu esti envicigita en la venontan Kalendaron.